



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 8 Eŭroj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

COMPTE - RENDU DE NOTRE ASSEMBLEE GENERALE

Malgré la canicule, se sont réunis à Hérouville, le dimanche 19 Juin 2005, des espérantistes du Havre, de Rouen, d'Hérouville, de Mathieu, de Granville. Aux 16 présents, il faut ajouter une trentaine de "pouvoirs", ce qui prouve l'intérêt porté par nos adhérents à notre petite association régionale. Participe aussi à nos débats, bien qu'invité en tant qu'artiste pour animer la partie récréative, Sébastien Erhard qui interpréta avec un grand talent "Les exercices de style" de Raymond Queneau.

Les rapports moraux et financiers ayant été approuvés à l'unanimité, un débat s'engagea concernant la nécessité d'une association régionale. Les activités des groupes étant les plus importantes, est-il besoin d'avoir une fédération normande ? Il faut constater que la majorité de nos membres demeurent dans de petites localités et sont isolés. Un mouvement régional est nécessaire pour les stimuler et les aider. Jusqu'ici, c'est surtout le bulletin qui a assumé ce rôle. Sébastien intervint pour nous expliquer l'organisation et les objectifs de la région Bretagne.

Depuis de nombreuses années, en Normandie, nous avons deux associations : l'"Union des Espérantistes de Normandie" qui édite "Normanda Bulteno" et qui perçoit vos abonnements - cotisations et la "Fédération Normande des Centres Culturels Esperanto" qui ne servait plus à rien. Cette dualité remonte à une époque lointaine où des malentendus étaient survenus entre les membres. Nous avons donc décidé de fusionner ces deux associations en une seule qui prend le nom : "ESPERANTO - NORMANDIE". Nous utilisions déjà cette dénomination mais maintenant, ce sera officiel. La fusion des deux associations a entraîné la refonte des statuts. Ces décisions prises à l'unanimité par l'Assemblée Générale seront déclarées à la Préfecture de Seine Maritime.

Les statuts devront être complétés par un règlement intérieur. Il sera aussi nécessaire de déterminer la nature des relations que nous aurons avec "ESPERANTO - FRANCE", organisation nationale qui nous demande de signer un accord. Ces questions seront traitées par le nouveau Conseil d'Administration (Estraro) dès qu'il sera entré en fonction, ce qui n'est pas encore le cas en raison des vacances.

Un événement important pour l'avenir de notre association a été le renouvellement du Conseil d'Administration qui a constitué son bureau:

Président : Sébastien ERHARD (alias Henri de Sabates) - 25 ans ; li loĝas en Canteleu apud Rouen

Vice - Président : Yves NICOLAS - 53 ans; Hérouville St Clair (14)

Secrétaire : Marco TEANI - 46 ans ; Rouen

Secrétaire Adjt : Quentin MAMERI (env.) 20 ans ; Rouen

Trésorier et

Bulteniste : Petro QUILLAUD (en attente de retraite espérantiste) ; Grand Quevilly

(Drôle de parité !!!!!)

Le Conseil d'administration est aussi composé par les membres actifs et les représentants désignés par les groupes.

Le contrôleur aux comptes est toujours Pierre JOUVIN

A la demande de Gérard SENEAL, il a été décidé que les groupes s'engageaient à recevoir, chez l'habitant, une délégation de Japonais(es) qui désirent découvrir la Normandie.

Petro KIJU

NIA GRUPOJ :

HAVRA ESPERANTISTA GRUPO : Un site havrais à découvrir [http : // esperanto-lehavre.org](http://esperanto-lehavre.org)

La gvidilo "Turismo kaj Esperanto" estas preta ĉe : www.gvidilo.org Vizitu ĝin kaj aldonu viajn proprajn informojn

Le groupe du Havre a édité pour ses adhérents un "Bulletin d'Infos - Été 2005". On peut y lire, entre autres que des dépliants en esperanto ont été disposés par le groupe à la Cathédrale, à l'Eglise Saint Vincent, aux châteaux de St Maurice d'Ételan et de Cany, à la Maison de l'Estuaire et au Pont de Normandie, ainsi que dans les offices de tourisme du Havre, Harfleur et Caudebec en Caux. Le groupe travaille sur un dépliant regroupant les villes jumelées d'Allouville Bellefosse en France et de Liernu en Belgique, ces deux villes possédant un chêne millénaire. Le Havre étant maintenant inscrit au patrimoine mondial de l'humanité, il sera édité un dépliant que nous traduirons en espéranto. Des fiches touristiques sur la Seine Maritime sont installées en français et en espéranto sur le site. Le Comité Départemental du Tourisme de Seine Maritime, la ville du Havre, le Parc Naturel des Boucles de la Seine Normande nous ont demandé une copie des fiches correspondantes. Un classeur est disponible au centre de vacances du Club du Soleil à Yport, à la chambre d'hôtes d'Yvetot dont la propriétaire parle Espéranto, au gîte rural de Saint Antoine la Forêt et au gîte d'étape de l'Union Touristique des Amis de la Nature du Havre.

A St Maurice d'Ételan, l'abbé Bécu, prêtre de la paroisse parle plusieurs langues, dont l'Espéranto (Il est adhérent de notre association)

CHERBOURG :

En 2006, le groupe de Cherbourg organisera le congrès national de la Franca Fervojista Esperanto Asocio dans le VVF de Portbail (50). Ce congrès aura lieu du 7 au 10 avril (ou du 7 au 14 Avril) Le Président Pierre Robiolle nous informe que tous les espérantistes normands (même s'ils ne sont pas cheminots) y seront les bienvenus. Le programme de ce congrès vous sera communiqué dans le prochain bulletin.

HEROUVILLE SAINT CLAIR :

Gigi et Gérard SENEAL sont rentrés d'un voyage de 7 semaines au Japon. De Tokio à Sapporo, en passant par Yokohama, Toyota, Kyoto et d'autres villes.

Leur projet était de suivre la floraison des cerisiers, événement capital de la vie des Japonais.

Chemin faisant, ils ont rencontré plus de 120 espérantistes et par 10 fois, ils ont présenté la Normandie en utilisant cartes et diapositives. Gros intérêt des Japonais, espérantistes ou non, pour le débarquement du 6 Juin 1944. Grand désir aussi de visiter notre province : voyez dans le compte-rendu de notre Assemblée générale la décision prise de recevoir dans nos groupes quelques Japonais logés dans des familles espérantistes.

LES ANDELYS :

Sylvie Bonnet nous communique :

En Les Andelys, ni kunvenas 1-foje ĉiu dua semajno, por konversacia rondeto, en Maison des Associations. Ni rekunvenos ekde meze de Septembro.

GRAND QUEVILLY :

De kiam Petro KIJÓ decidis ne plu gvidi kurson en Grand Quevilly, la grupo tre malofte kunvenas kaj ni ne plu disponas urban kunvenejon. Tamen, kelkaj membroj akceptis ĉi somere Marie Line kiu nun laboras en La Réunion kaj kiu profitis longajn feriojn por partopreni Universalan Kongreson en Vilnius.

ROUEN :

Catherine DOMINGO daŭre gvidas kurson en librovendejo "L'Insoumise" en urbocentro. La librecana grupo metis sian ejon je nia dispono, sen kondiĉoj. Do ĉiuj rajtas partopreni la kurson malgraŭ la neneŭtrala etoso de la ĉambro

Multaj esperantistoj loĝas en Rouen kaj ĉirkaŭaj urbetoj. La nunaj cirkonstancoj estas nun favoraj por restarigi la grupon.

YVETOT : Pierre POTTIER daŭre gvidas kurson.

KAJ NUN LA KASISTO !!!

RIGARDU ĈU VIA NOMO APERAS EN ĈI - SUBA LISTO :

ĈU VI PAGIS VIAN ABONON POR 2005 :

Listo de pagintoj : Gesinjoroj : Bachimont, Bataille, Bessière, Becue, Bonnet, Caron, Chalm, Colombel, Defrance, Dubois, Dufeu, Duflo, Dufresne, Dufossé, Duval, El Bahri, Erhard, Esp.Cotentin, Dolard, Evrard, Freslon, Gibert, Guérault, Guerre, Guilmoit, Hubert, Huet, Jean, Haulard, Hébert, Helbert, Jourdain, ML, Jouvin, Lamy, Lebrun, Lecouvreux, Lehericey, Lemarchand, Leprévost, Leroy, Lesueur, Lévesque, Lévy, Loisel, Longuet, Magerel, Marie, F, Mary, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Paris, Paumier, Pottier, Quillaud, Rauch, Robiolle, Rolland, Schertzer, Séry, Tailpied, Tanguy, Teani, Tierce, Touileb, Turmel, Zilliox

PREZENTO KAJ PROJEKTOJ DE NIA NOVA PREZIDANTO

Iam, antaŭ 5 jaroj, sin prezentis dum semajna kunveno de Grand Quevilly - grupo, junulo kiu diris " mi studas plurajn lingvojn kaj mi interesiĝis pri Esperanto kiun mi lernis sola, pere de Assimil-metodo. Mi nun, deziras ĝin praktiki kaj konatiĝi kun esperantistoj ."

Ni tuj konstatis ke li tre flue parolis. Li revenis plurfoje kaj rapide trovis ideojn por vivantigi la grupon. Intage, li diris al mi ke li ne plu partoprenos niajn kunvenojn ĉar li estas dungata de "Esperanto 22" kun kontrakto "Junul -dungito" (Contrat emploi - jeune) Dum 5 jaroj, li do profesie laboris por la Esperanto - asocio de Côtes d'Armor.

Tio estis riĉo - plena sperto por li mem kaj por la asocio Se vi volas scii kion li faris dum la 5 pasintaj jaroj vi vizitu la paĝon :<http://esperanto.bretonio.free.fr/animateur.htm>

Jen resumo de liaj estontaj prokektaj :

"Multaj homoj jam demandis al mi ĉiufoje kiam mi anoncis mian situaci-ŝanĝon: "Kaj nun, kion ci faros poste?". Profesie, mi estos senlaborulo (jes, finfine iom da ripozo! ...sed fakte, ne tiom da ĉar multegaj projektoj anstatauos mian eksan laboron). Do, profesie-ĉele mi pretigos la CAPES pri Klasikaj Literoj (konkurso por iĝi instruisto pri la latina, pri la malnov-greka [fakte ne plu, ĉar bedaŭrinde ne plu estas lernantoj por tiu bela lingvo] ...kaj bedaŭrinde ankaŭ eble pri la franca lingvo).

Koncerne Esperanton, mi unue devas finpretigi la pedagogian valizon, kvankam mi ne plu estas profesiulo sed kiel volontulo. Cetere, dum pasinta junio estis kreita la federacio Esperanto-Normandio kaj la normandoj elektis min kiel prezidanto. Ah, mi volis iom paŭzi pri Esperanto post miaj kvin jaroj da laboro, sed verŝajne ne estos tiel: mi esperas, ke per mia prezidanteco, mi sukcesos helpi por iom revigligi la movadon en Normandio. Mi havas kelkajn ideojn por tio, interalie mi ŝatus krei Esperanto-klubon en Rouen por la studentoj...

Alia Esperanto-projekto mia estas, ke mi provos kontakti la eldonejon ASSIMIL por proponi al ili renovigi la lernolibron "ASSIMIL : Esperanto sen peno". Tio estas grava afero laŭ mi, ĉar estas la sola Esperanto-lernolibro trovebla kaj mendebla en ĉiuj librejoj. Kaj laŭ mi la ASSIMIL-metodo estas ege efika metodo se oni faras ĝin asidue. Multaj esperantistoj komencis lerni per tiu metodo, sed la problemo estas ke la nuna versio estas jam iom malnoviĝinta kaj ĉefe ne tre bona aranĝita (mi oftege renkontis esperantistojn, kiuj diris al mi, ke ili komencis per tiu lernolibro sed forlasis ĝin post 2 semajnoj ĉar ĝi estas tro malfacila: fakte, la unuaj lecionoj estas tro malfacilegaj kun multegaj neutilaj vortoj, kompare al la lastaj kiuj pli faciligas... sed tio povas doni al la lernanto falsan impreson, ke Esperanto estas tre malfacila lingvo). Laŭ mi (kaj ankaŭ laŭ ASSIMIL kiu foje tion aludis al mi okaze de diskutoj kun ili), tiu metodo estas tre bona rilate efikecon (nur por la homoj, kiuj finas ĝin) sed ĝi vere bezonus renovigon. Do, longa laboro en perspektivo... kaj ankoraŭ ne paŭzo pri Esperanto ;-)

Sed tio ne estas ĉio: mi havas ankaŭ multegajn projektojn rilate al teatro (mi havas tro da projektoj, mi timas ke mi bedaŭrinde devos elekti inter ili), kelkaj en Esperanto, kelkaj en aliaj lingvoj...

En septembro, mi alvenos Normandien nur post la 24-a de septembro ĉar antaŭe mi estos apud Parizo por staĝo pri farado de maskoj el led (por Commedia dell'Arte).

Mi ŝatus alighi teatro-trupon, kiu ludas en la malnova greka lingvo. Mi ankaŭ emus repraktiki "improvizadajn konkursojn", sed por tio mi eble ne havos sufiĉe da tempo.

Mi firme intencas enscenigi iun teatraĵon, kiun mi verkis antaŭ nelonge kun amiko.

Pri mia unuopa spektaklo "Stil-Ekzercoj", mi eble ĉesos ĝin prezenti, almenaŭ en Esperanto-medio ĉar jam multaj homoj vidis ĝin (ĉefe ĉe junularaj renkontiĝoj). Eble mi ŝatus iam prepari alian unuopan spektaklon en Esperanto, mi havas kelkajn ideetojn, sed tio ne estos por baldaŭ pro tempo-manko...

Por la momento, kiel Esperanto-spektaklo, mi pretigos alian teatraĵon duopan ĉi-foje, kun esperantista aktoro el Tuluzo.

Cetere, mi havas ankaŭ ideon pri iu internacia teatro-trupo en Esperanto, kiu trairus Eŭropon por prezenti surstratajn spektaklojn en Esperanto al la neesperantlingva publiko (kaj mi pensas, ke Commedia dell'Arte povus esti bona peranto por tia projekto, ĉar tiu speco de teatro multe uzas ankaŭ la korpan lingvon kaj do facile kompreneblas de alilingva publiko)...

Kaj mi havas ankoraŭ multegajn aliajn ideojn, sed prefereble ili nun restu nur ideoj kaj mi ilin konservu por pli poste

Se mi jam sukcesas fari ĉion ĉi-supre priskribitan, tio jam estos bonege!

Do, por tiuj, kiuj timas ke mi enuos pro mia senlaboreco, ne zorgu: mi havos por fari, eĉ tro!"

Sébastien ERHARD

Gratulojn kaj bonan kuraĝon Sébastien (aŭ : artista nomo Henri De Sabates)

Mi memorigas al vi la artikolon de Henri Rousseau aperintan en antaŭa bulteno pri sufiksoj malofte uzitaj : oz, iv, iz.

Alain Chalm de Havra grupo donas sian opinion:

Mi iom dubas pri utileco de sufikso "iz". En Plena Vortaro, "sali "estas "meti salon en..." "Sali la supon". Do kial aldoni "iz". "Najli" = fiksi per najlo Ekz. "najli keston". Sed "elektrizi" estas provizi per elektro : elektrizi vilaĝon Efektive, tiuj afiksoj estas en la Plena Vortaro. Do kiam tio simpligas kaj precizigas la lingvon, estas bona rimedo sed kiam tio estas aldonado neutila , ĝi estas evitebla. Do "najli" estas fiksi per najloj (clouter) kaj "najlizi": kovri per najloj (clouter) .

NIA BULTENO

En relisant d'anciens bulletins de notre association, je constate qu'il fut une époque où la participation des adhérents était plus importante et plus diverse. La rédaction est l'affaire de tous. Dans la mesure du possible, le rôle du rédacteur devrait se limiter à la correction, à la frappe, à la mise en page et à l'envoi. Donc envoyez moi vos articles en espéranto sur tous les sujets (voyages, compte-rendu de congrès, vos opinions sur des sujets d'actualités etc....) et en français sur des sujets ayant trait à l'espéranto. Même des débutants peuvent écrire. A vos plumes !!!

Je me suis efforcé de vous adresser le bulletin régulièrement : Un numéro tous les 3 mois. Le nombre de pages est fonction du nombre d'articles. Il devrait refléter la vie de tous les groupes et les actions de tous les membres actifs même isolés.

D'autre part, pour des motifs personnels et familiaux, je désire quitter cette activité. Je n'ai pas été nommé "Rédacteur à vie". Je m'occupe du bulletin depuis le N° 175 de novembre 1992 c'est donc mon 50ème numéro, depuis 13 ans ! Pour me remplacer, il faut une personne connaissant bien l'espéranto, possédant un ordinateur et déjà engagé dans le mouvement espérantiste, si possible, pour y trouver des informations. Que mon successeur se fasse connaître au plus tôt.

Petro KIJO

Vi nomu min "PETRO" !!!

En niaj okcidentaj landoj, ĉiu nova lernanto deziras scii kiel traduki esperanten sian propran nomon (aŭ bapto-nomon)

En Eŭropo, depost 2000 jaroj, estis kutime nomi infanon laŭ la nomoj de sanktuloj trovitaj en Malnova kaj en Nova Testamento. Aldoniĝis nomoj de sanktuloj poste konsekraj de katolika kaj ortodoksa ekleziularoj. Pro kristanigo de tuta Eŭropo, ĉiuj propraj nomoj estis la samaj en ĉiuj landoj kun transformo kaj traduko en ĉiujn lingvojn. Ekzemple : Pierre, Peter, Petar, Pietro, Pedro ktp....)

Sed Esperanto estas disvastigata en tuta mondo, kaj precipe en landoj ne-judkristanaj. Do, tute ne eblas traduki niajn eŭropajn proprajn nomojn en ĉina, araba, hinda lingvojn.

Nun, en Francio, novaj leĝoj ebligas nomi infanon laŭvole, kondiĉe ke la nomo ne estu ridiga kaj ne perturbu, poste, la novnaskiton. Pro tio, multaj strangaj nomoj aperas kaj la klasikaj fariĝas eksmodaj.

En esperantistaj medioj, multas ŝatas, okaze de kunveno aŭ de kongreso traduki sian nomon esperanten. Sed tuj, post la kunveno, ĉiu retrovas sian oficialan, nacian nomon.

Por mi estas alia afero. Nomas min "Pierre" nur la homoj kaj familianoj kiuj konis min dum infanaro. Mi studis Esperanton kiam mi estis 19 jaraĝa.

Kelkajn jarojn post mia esperantistiĝo, mi deziris aliĝi junularan movadon. Kiam mi aliĝis grupon de Junular Gasteja movado, iu kamarado demandis al mi "Kiel vi nomiĝas" ? Mi respondis "Pierre" Kaj li diris "Neeblas ĉar en la grupo jam estas 3 Pierre : Grand Pierre, Petit Pierre kaj Pierrot ! Ni do decidis ke mia nomo en la grupo estos "Petro". Do ĉiuj nomis min "Petro" kaj precipe mia edzino kiun mi renkontis en tiu grupo. Poste, ĉiuj familianoj, bogepatroj, bogefratoj, genevoj, ktp.... nomis min tiel. Eĉ, en la fabriko kie mi laboris, miaj kolegoj nomis min "Petro". Mi konfesu ke nun estas strange por mi kiam oni nomas min "Pierre" !!!

Ankaŭ, mi esperantigis la skribon de mia familia nomo kiam mi konstatis ke miaj nefrancaj geamikoj ne kapablis prononci mian nomon pro la terura franca ortografo kiu tute ne estas fonetika.

Petro KIJO

JAM PRIPENSU LA LOKOJN KIE VI UZOS ESPERANTON DUM 2006 !!!!!

La Universala Kongreso okazos, somere, en la belega itala urbo FLORENCE (en 2007 en Yokohama)

La Kongreso de SAT okazos en BEOGRADO (Serbio)

La Kongreso de SAT-Amikaro dum Pasko en MOULINS (Francio)

EUROPE - DEMOCRATIE - ESPERANTO

Lors des élections du Parlement Européen, pour la première fois des listes de candidats espérantistes ont été proposées aux électeurs. En fonction du manque d'expérience et surtout du manque de ressources financières les résultats furent encourageants. (Quant on pense que les électeurs durent fabriquer eux-mêmes leur bulletin de vote et qu'ils ne reçurent pas de profession de foi ...!...) EDE continue et envisage de préparer la campagne pour les prochaines européennes.

Esperanto - Normandie ayant toujours ouvert ses colonnes à toutes les associations espérantistes accepte de passer le communiqué ci-joint d'EDE mais bien entendu reste tout à fait neutre à l'égard de cette organisation.

COMMUNIQUE :

Vous connaissez déjà les avantages de la langue Espéranto en tant qu'espérantophone ou en tant qu'espérantiste. Vous avez remarqué que depuis son existence, nos hommes politiques ont toujours dans un premier temps eu de la sympathie, mais au moment de prendre une décision importante, le constat est toujours le même : ils abandonnent notre idée car le multilinguisme est privilégié (dans la réalité, c'est l'anglais). Mais surtout, ils profitent de l'ignorance de la population et des médias. Lors du dernier congrès qui a eu lieu en Lituanie, avez-vous remarqué la moindre information dans les médias français ? Quand un congrès a lieu en France, c'est seulement la presse régionale qui parle de nous (et pas toujours dans des termes valorisants)..

Partant de ce constat, le mouvement Europe Démocratie Espéranto est né. La priorité de son programme est l'amélioration de la Démocratie dans l'Union Européenne avec l'outil formidable qu'est l'Espéranto. Le mouvement est totalement neutre et dans ses statuts, il participe seulement à l'élection européenne. Il n'est pas utile de participer aux autres élections car il faut quand même garder des contacts avec les élus locaux ou nationaux que certains ont pu avoir.

Qu'avez-vous remarqué en 2004 ? Nous avons eu une vitrine Nationale avec EDE !!!

Certes, les scores étaient faibles, mais c'était un ballon d'essai. La plupart des autres régions françaises ont participé à hauteur de 20% au financement de la campagne officielle (Bulletins de vote, Professions de foi, Panneaux électoraux) car elle n'est pas gratuite pour les petits partis. Malheureusement, les sympathisants dans le Nord-ouest ont été moins nombreux et nous n'avons été présents symboliquement que dans les villes de Caen et Rouen. Cet été, EDE Nord-Ouest s'est affilié à l'Association de Financement EDE France qui permet une défiscalisation des dons. Par cet avantage fiscal et par le temps qui nous reste, on peut réfléchir sur les objectifs financiers pour la préparation des élections européennes de 2009.

Notre ambition pour 2009 est de financer 30% des bulletins de vote (format A6) présents dans les Mairies, 100% des professions de foi (format A5, recto NB) présents dans le courrier que reçoit l'électeur à son domicile. Faisons l'impasse sur le reste (70 % des bulletins de vote en Mairie et 100% des bulletins de vote à domicile car le manque de ceux-ci pourra être compensé par un téléchargement sur Internet, affiches électorales officielles).

Le coût approximatif serait d'un peu plus de 62000,00 Euros. Sur nos 4 régions, le nombre d'espérantistes (inscrits régulièrement dans les clubs) avoisine les 170. L'objectif pourrait être atteint si chacun donnait tous les ans 73 euros. Sachons qu'il sera difficile de convaincre tout le monde, fixons le somme de 100 euros par personne et par an.

Avec la défiscalisation des dons, l'effort demandé représente en fait 40 euros. Bien sur, nombre d'entre vous estiment que les espérantistes contribuent déjà à un effort financier important mais sachez convaincre des amis ou des proches sur l'utilité de notre action.

Merci pour votre soutien,
Dankon por via subteno !

Marc ANSELMi, Trésorier d, E°D°E Nord-Ouest
1 Rue aux Foulons, Apt n° 5
62000 ARRAS
Tél : 03-21-48-59-54

BONŜANCO

Eĉ Dio suverena, ne ĉion povas fari,
Kaj de la oka tago, helpon li devis trovi.
Tial, al subdiuloj, li donis komisionojn,
Traktadi lianome la kurantajn aferojn.

Bonŝanco estas unu el la kunhelpantinoj.
La Mastro por misio, per precizaj komandoj,
Petis Ŝin prezentiĝi kiel ĝoja hazardo,
Por gemalfeliĉuloj for de Lia rigardo.

Tamen Bonŝanco ankaŭ, loĝas en la etero,
Kaj malfacile konas, l'aferojn de la tero.
Tiel Ŝi povas foje, iun eraron fari,
Kiam Ŝi nin deziras, per donaco favori.

Kaj ni krome agnosku ke nia monetiko,
Por tro preĝita Ŝanco, estas plia kompliko :
Eĉ estante Diino, kiel do povus Ŝi,
En la homaj kalkuloj, tro ofte, ne perdiĝi ?

Ĉar ekde la komenco de l' homaj Historioj,
Oni taksis valorojn per multaj monunuoj :
Frankoj, rubloj, dolaroj, liroj, ŝekeloj kaj aliaj.
Ĉu eblas retroviĝi ? eĉ kun povoj ĉielaj ?

Kompatema Bonŝanco nin vidas agitiĝi,
Kaj per la fronta ŝvito, monerojn amasigi.
Kormovita, kun volo, plenumi sian rolon,
Kredante plezurigi, Ŝi proponas ... obolon.

Nia bezono estas centmilope pli grava !
Kaj tiu monereto ne plu estas valida !
Ĉu ni rajtas indigni ? ĉu tio estus prava,
Se ni malestimante tiun sensignifaĵon,
Piede ĝin forpuŝus en apudan fosaĵon ?

Tute ne ! ĉar Bonŝanco ja estas erarema,
Sed same ja kapablas fariĝi kolerema.
Ni do Ŝin ne ofendu, juĝu ŝian intencon,
Por ke, niakoncerne, Ŝi konservu inklinon.

Ni do respektplene, pluku Ŝian donacon.

Henri ROUSSEAU